

# La Flamo de Esperanto

6-a de decembro 2024, numero 7

Redaktas Dmitrij Ševĉenko kaj Anna Striganova



## IJK-2025 en Indonezio bonvenigas! Atentu pri la novaj datoj

La 81-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) de TEJO okazos en Cisarua (Bogor), Indonezio, 9–16 aŭgusto 2025.



**CISARUA 2025**

La 81-an IJK organizas la Kongresa Komisiono (KK), internacia teamo gvidata de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) kaj Indonezia Esperantista Junulara Organizo (IEJO), kiu invitis gastojn en la kongreso.

Indonezia Esperantista Junulara Organizo (IEJO) estas unu el la plej novaj landaj sekcioj de TEJO, fondita en februaro 2017. En 2022, IEJO oficiale iĝis landa sekcio de TEJO en Indonezio.



La agado de IEJO celas ke la juna generacio de Indonezio lernu kaj uzu Esperanton surbaze de la spirito de mondpaco. IJK en Indonezio kreas perfektan momenton por realigi ĉi tiun celon.

Ĉiujn detalojn trovu ĉe: <https://ijk2025.tejo.org>



## Demandaro pri la 5-a Virtuala Kongreso

Kion vi opinias pri tiu ĉi-jara Virtuala Kongreso? Bonvolu respondi al la jena demandaro: [mallonge.net/postvk2024](https://mallonge.net/postvk2024)

Ni ĝojos ekscii pri viaj impresoj kaj plibonigi niajn estontajn eventojn!



# Unesko kaj Esperanto: 70 jaroj da kunlaboro por lingvaj homaj rajtoj

La 10-an de decembro 2024 okazos internacia hibrida kunveno en la urugvaja parlamentejo en Montevideo, kie antaŭ 70 jaroj estis aprobita la unua Unesko-Rezolucio pri kaj por Esperanto.



Unesko kaj Esperanto:  
70 jaroj da kunlaboro  
por lingvaj homaj rajtoj

70a datreveno de la  
Rezolucio de Unesko pri Esperanto  
(Montevideo, 10 decembro 1954)

Universala Esperanto-Asocio | Tutmonda Esperantista Junulara Organizo | Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj | Urugvaja Esperanto-Societo

La organizantoj de la evento estas Urugvaja Esperanto-Societo, UEA, TEJO kaj ILEI.

La Rezolucio de Montevideo estas grava mejloŝtono, kiu markis la unuan oficialan agnoskon de Esperanto fare de Unesko kaj la komencon de la oficialaj rilatoj de UEA kun tiu organizaĵo. Akceptita en 1954 dum la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Montevi-



deo, Urugvajo, ĉi tiu Rezolucio rekomendis al la Ĝenerala Direktoro de Unesko sekvi la evoluon de la uzo de Esperanto, agnoskante, ke la atingoj de la Esperanto-movado kongruas kun la celoj kaj idealoj de Unesko.

Ĉi tiu sukceso estis rezulto de la persista klopodado de UEA kaj aliaj esperantistaj organizaĵoj, kiuj kvar jarojn pli frue prezentis al Unuiĝintaj Nacioj (UN) petskribon subskribitan de preskaŭ 900 000 personoj kaj reprezentantoj de ĉirkaŭ 500 organizaĵoj, postulante, ke UN esploru la lingvan problemon tutmonde kaj la eblan rolon de Esperanto en ĝia justa solvo. La petskribo estis transdonita al Unesko por konsidero – kaj la rezulto estis malpli radikala, sed historia Rezolucio, kiu donis oficialan kaj konsultan statuson al la Esperanto-movado en Unesko.



Por festi ĉi tiun datrevenon, kaj sub la aŭspicioj de UEA, TEJO, ILEI kaj Urugvaja Esperanto-Societo, starigis komisiono konsistanta el lokaj esperantistoj kaj reprezentantoj de diversaj institucioj de Ameriko. Ĉi tiu komisiono nuntempe laboras por organizi internacian konferencon, kiu okazos la 10-an de decembro 2024, ekde la 9:00 loka tempo (12:00 UTC), en la Leĝodona Palaco (Parlamentejo) de Montevideo, la sama loko, kie oni akceptis la Rezolucion en 1954.

La celebrado inkluzivos prelegojn kaj prezentojn ĉeestajn kaj retajn, montradon de dokumentaj filmoj kaj artajn prezentaĵojn. La evento estos malferma al la publiko, kiu povos ĝin ĉeesti persone aŭ partopreni rete.

**En la decembra numero de la revuo *Esperanto* aperis la artikolo de Ulrich Lins "Sepdek jarojn post Montevideo: Unesko en 1954 rekonis la meritojn de Esperanto". Kaj aliaj materialoj pri la temo.**

**Por sekvi la eventon rete, vizitu la paĝon ĉe  
Eventa Servo:**

**<https://eventaservo.org/e/Montevideo-70>**



# Centjara vivjubileo de Esperanta poetino

★ Spomenka Štimec

En la zagreba hejmo por maljunuloj okazis kun granda programo la 22-an de novembro 2024 grava festo: la centjara vivjubileo de la esperantlingva poetino Zora Heide. Naskita en Levinbovac ĉe Virovitica, Zora knabinaĝe lernis Esperanton de sia patro Mijo Vinceljak, vilaĝa instruisto. Ŝi ekstudis juron, sed la Dua mondmilito interrompis la studojn. Ŝi fariĝis laboratoria teknikistino kaj eklaboris. En la sesdekaj jaroj Esperanto fariĝis por ŝi edzperanto, kaj ŝi ekvivis en Kopenhago kun sia dana edzo. Poste ŝi translokiĝos al Svedio kaj poste al Islando. Poligloto, ŝi fariĝis membro de Dana verkista asocio kaj poste de Sveda verkista asocio. Ŝi membris en Esperantlingva verkista asocio kaj Akademio Literatura de Esperanto. La tutan vivon ŝi verkas poemojn kaj prozon, abunde eldonas. Ŝi es-



Sur la foto: Spomenka Štimec enmanigas florojn al la jubileanta Zora Heide.  
Foto de Dubravko Toplak

perantigis multajn verkojn el la kroata literaturo. Ŝia poezia verkaro estos en la fokuso de la ĉi-jara Zamenhof-taga festo, kiam oni festos ankaŭ „la aliajn poetajn centjarulojn“ Marjorie Boulton kaj William Auld. Pri ili parolos Zlatoje Martinov kaj koncertos Saša Pilipović.

## La Konga Stelo

Tre mallonga, sed grava spektaklo pri la tute nova afrika revuo *Konga Stelo* estas daŭre spektebla ĉe la platformo de la VK.

Esperanto en DR Kongo vivas jam pli ol jarcenton. Eblas legi pri tio en la verko de Heidi Goes *Afero de Espero*. Sed la plejparto da la kongaj esperantistoj, des malpli la junaj, mem ne scias pri la evoluo de la movado inter la jaroj 1900 kaj 2000. Iam DKEA, la landa asocio, eldonis revuon *Vekiĝo* kaj jarlibron. Sed ili atingis malmultajn esperantistojn, kaj verŝajne ne plu estos produktataj. La junulara asocio de DR Kongo (DKEJA)



Esperanto vivas en DR Kongo de pli ol jarcento,

post la elekto de nova estraro en la jaro 2023, decidis ekeldoni novan revuon. Ĝi devis enhavi informon pri la agado de DKEA, DKEJA kaj la landa sekcio de ILEI. La revuo ricevis la nomon *Konga Stelo*, ĝia redakto-

ro estas Joel Muhire. Pro multaj problemoj ene de la lando, Joel sukcesis prepari la unuan numeron nur en somero de la 2024, presi ĝin dume ne eblas, sed ĝi akireblas pdf-forme. Por esti interesa al la legantaro, la revuo enhavas diverstemajn materialojn: movado, kulturo, lingvoj. Estas bonvenaj ankaŭ beletraĵoj. Joel esperas, ke le revuo estas ankoraŭ unu kialo por liaj samlandanoj resti en la movado kaj la movado progresu.

En la rubriko “Lingvo” aperos malgrandaj lecionoj pri kvar naciaj lingvoj de DR Kongo, en la unuaj du numeroj aperis lecionoj pri la svahila. Sekvos la lecionoj pri ĉiluba, lingala kaj kikonga. Kiel aludas la nomo *Konga Stelo*, la redaktoro ŝatus, ke lia revuo lumu ne nur por kongaj esperantistoj. Legi ĝin kaj ankaŭ aŭtoris povas ĉiu deziranto.

Elŝuti la numerojn de *Konga Stelo* vi povas tute senpage en la Vikio de UEA:

[https://uea.org/vikio/Konga\\_Stelo\\_Revuo](https://uea.org/vikio/Konga_Stelo_Revuo)



# La teamo de

Por plejparto de la partoprenantoj de la Virtualaj Kongresoj restas nevideblaj la homoj, kiuj funkciigas ĝin por ni. Kaj tio ja estas grandega laboro, kiu daŭras malproksimen ekster la kadro de la kongresoj mem! Kaj ja ĉiu preleganto scias, kiom agrable estas senti subtenon de sia teknikisto, kiu helpos vin pri teknikaĵoj, resendas al vi demandojn kaj foje eĉ interesiĝas pri tio, ĉu vi prenis iom da akvo por prelegi komforte :) Koran dankon al vi pro via zorgo kaj via laboro!



**Peter Baláž**



**Dorota Rodzianko**



**Sonja Zaretskaia**



**Matthieu Desplantes**



**Claire Divoy**



**Emma Villemin**



Ni kore dankas nian karan korektiston Rob Moerbeek pro lia zorgema ĉiutaga provlegado de ĉiu numero de *La Flamo de Esperanto*, kaj ankaŭ pro lia subteno dum la tuta VK. Lia bonkora subskribo sub la unua provlegita numero donis al ni inspiron. Kara Rob, koran dankon pro via multjara kunlaboro pri la revuo *Esperanto*, pri IKU-libroj kaj pri multo alia. Ni bonege scias, kiom sindona estas via laboro almenaŭ pro tio, ke kiam ni renkontis vin dum Esperanto-aranĝoj, se vi ne estis parolanta kun iu, vi ĉiam sidis kun aro da paperoj kaj ion korektis.

Koran dankon al vi pro via laboro!

